



PENSEO

N-ro 209

mar. / 2009

Monata Beletra Revueto en Esperanto
Honorita de Premio Grabowski, 1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 20-a jaro <http://www.elerno.cn/penseo/penlisto.htm>

Guozhu

Okaze de la Virina Tago en la 8-a de marto, mi ofte memoras la vortojn de avino Bingxin (1900-10-05/1999-02-28):

Se en la mondo ne ekzistas virinoj, tiam mankas al nia mondo 5 dekonoj da vero, 6 dekonoj da bono kaj 7 dekonoj da belo.

Mi opinias ke tio estas la plej klasika fama diro pri virinoj en la mondo.

Bingxin



Bingxin — glacie pura koro —
amata avino centjara,
al infan-legantaro kara
ĉiam leteris kun fervoro.

Ŝia homeco kaj laboro
modelas per honesto rara.

Bingxin — glacie pura koro —
amata avino centjara.

Kaj ŝi surskribis je favoro
vorton pri Esperant' deklara.
Varma subteno malavara
vivos en nia karmemoro.

Bingxin — glacie pura koro !

Xu Zhimo (1897—1931)

Ĝojo de Neĝero

se estus mi neĝero
leĝere firtanta en aero
mi devas teni la direkton—
flirte, flirte, flirte
direkte al la tero
mi volas flugi ne al val' soleca
nek al montĉeno trista
nek al dezertaj stratoj por lamenti
flirte en libero
vidu, mi tenas la direkton
mi dancas ĉarme sur ĉielo
jam celas al kvieta la loĝsfero
atendas ŝin alveni por vizito en
ĝardeno
flirte, flirte, flirte
aĥ, ŝi odoras per arom' de cinabra
umeo
mi tiam pere de korpa leĝero
malpeze alkroĉiĝos al vestbrusto ŝia
sin premos al mildonda sino ŝia
fandiĝos, fandiĝos, fandiĝos
en ŝian mildan bruston kun tolero



elĉinigi **Veĵdo**

Ĉineske

Lily

Kac-suĉado

—laŭ ĉinesko Shuilongyin*

manfrotad' de l' suĉul'

faras kacon rigida

ŝia lango

ŝmace lekas

per rapida

ronda movad'

de kackapo

piramida

ĝis pufaj ovoj

jam la ilo

fariĝas

humida

ŝia buŝ' incita

mordetas

per avida

amdeziro

ĝin kaj glitas

mov' senbrida

lek' senĉesa

jam lasas ĝin

sku-trepida

jen li nun pretas

eniri ŝin

seks-memfida

**Shuilongyin (Akva Drako): ĉina fikforma poemo el du strofoj po 12 versoj de 67,444,444,5433 / 6, 34, 444,444,544 silaboj, laŭ rimaranĝo xa,xxa,xxa,xxxa / a,xa,xxa,xxa,xxa (x= senrima)*

Vejdo

Sendorma Nokto

—laŭ ĉinesko Suzhongqing*

en koro brulas la flam'

sendormas mi jam

turniĝante ade

pro perdita am'

malvera

vort-ornam'

mava dram'

jam foriĝis

oh, vanuis

falsa proklam'

**Suzhongqing (Kora Sento): ĉina fikforma poemo el du strofoj kun 4 kaj 6 versoj respektive de 7,5,65 / 33,3,444 silaboj, laŭ rimaranĝo a,a,xa / xa,a,xxa (x=senrima)*

Zigzaga Montuojo

—laŭ ĉinesko Pusaman*

kvazaŭ smeralda ruband'

ĝi spiralas al bluland'

tra densa nebul'

en flosa nublul'

grimpanto vera
 kun volo fera
 marŝadas pene
 ĝis pint' senĝene



**Pusaman (Budhista Dancisto): ĉina fikforma poemo el du strofoj po 4 versoj de 7,7;5,5; / 5,5;5,5 silaboj kun para rimo*

Sero

Falĉi Sovaĝajn Herbojn

—laŭ ĉinesko Xiaochongshan*
 sovaĝherboj kun konspir'
 volas okupi
 pri ramp-ir'
 vastan teron sen ajn gir'
 gravedaj
 jam je fi-aspir'

 jen per mana tir'
 jen per falĉado
 de seg-ŝir'
 homoj jen per unu spir'
 senigas
 ilin laŭ dezir'



**Xiaochongshan (Malgranda Montvico): ĉina fikforma poemo el du strofoj po 6 versoj de 7, 53,7,35*

/5,53,7,35 silaboj, laŭ rimaranĝo a,xa,a,xa
 (x=senrima)

Antaŭvespere de Kristnasko 2008

—laŭ ĉinesko Jianzi Mulanhua*

Nun tie ĉi
 ĝoj' plenplenas en Ĉini'.
 Juna popol'
 orgias kun sang' en bol'.
 Eĉ fremda fest'
 furoras en ĉina vest'.
 Ĉu la progres'
 homa aŭ vigla eksces'?

**Jianzi Mulanhua (Mallongigita Melodio Magnoli a): ĉina fikforma poemo el du strofoj po 4 versoj de 4,7; 4,7 silaboj kun para rimo.*

Eto

Vintro en Strateto

—laŭ ĉinesko Jiangnanchun*

malseka
 kotplena
 vojeto ŝtona
 sen bru' promena
 sub malforta sunlumo
 oblikve lante trena

 eksonis
 paŝbruo
 sole pasanta
 fale kun skuo
 rapide revenhejma
 por varmalita ĝuo



**Jiangnanchun (Printempo Sude de Rivero): ĉina*

